"Do vi kondutis neĝentile, proponante ĝin" kolere Alicio respondis.

"Ankaŭ vi, sidante ĉe ni sen invito" akre respondis la Martleporo.

"Neniu sciigis ke la tablo apartenas at *vi*" diris Alicio "oni ja surmetis manĝilarojn por multe pli ol tri personoj."

"Vi tranĉigu la hararon" subite intermetis la Ĉapelisto. De l' komenco li estis rigardeginta Alicion kun evidenta scivolemo, kaj nun la unuan fojon alparolis ŝin.

"Ne decas kritiki la personaĵojn; tio ja estas tre malĝentila." Alicio diris tion tre severe.

La Ĉapelisto tre larĝe malfermis la okulojn, aŭdinte tion. Anstataŭ respondi, li subite proponis la enigmon: "Je kio la korvo similas skribotablon?"

"Bone, oni komencas proponi enigmojn: jam nun ni amuziĝos" pensis Alicio, kaj ŝi diris laŭte: "Mi kredas ke mi sukcesos mem solvi tion."

Ĉu per "solvi" vi intencas diri ke vi povos trovi la respondon?" diris la Martleporo.

"Ĝuste tion" respondis Alicio.

"Tamen, vi devas ĉiam diri kion vi intencas" diris la Martleporo.

"Tion mi ĉiam faras" Alicio komencis vigle "almenaŭ ... (per voĉo pli duba) ... mi ĉiam



intencas kion mi diras, kaj jen la sama afero, ĉu ne?"

"Tute ne sama" kontraŭdiris la Ĉapelisto. "Laŭ tiu logiko, oni povus diri, ke samaj estas 'Mi vidas kion mi manĝas' kaj 'Mi manĝas kion mi vidas.'"

... "Laŭ tiu logiko, oni povus diri" intermetis siavice la Martleporo "ke samaj estas 'Mi ŝatas kion mi ricevas' kaj 'Mi ricevas kion mi ŝatas.'"

La Gliro certe ne vekiĝis, li certe dormparolis; jen lia diro:

"Laŭ tiu principo, oni povus diri, ke samaj estas 'Mi spiras dum mi dormas' kaj 'Mi dormas dum mi spiras.'"

"Por *vi*, ili fakte estas samaj" diris la Ĉapelisto.

Sekvis kelkminuta silento, kiun Alicio profitis por rememori al ĉiuj faktoj de si konataj pri korvoj kaj skribotabloj.

La Ĉapelisto unue rompis la silenton. Alicio rimarkis en la lastaj momentoj, ke li prenas la horloĝon el sia poŝo kaj maltrankvile observas ĝin, ke fine li skuis ĝin kaj tenis apud la orelo. Tiam turnante sin al Alicio li demandis: "Kiun daton ni havas?"

Post iom da pripenso Alicio respondis: la kvaran Majo.

"Sekve, ĝi eraras je du tagoj! Ĉu mi ne diris